



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado aprilo (1) - '92

LA HIMNO KAJ LA DUA JARCENTO

En 1884 okazis la unua kongreso de la internacilingva movado en Fridrikshaveno (ŝtato Baden, suda Germanio). La aranĝo komenciĝis per prezentado de la Volapuk-himno, verkita de jesuita studento Franz Zorell, komponita de Johann Martin Schleyer. La paroka koruso de Fridrikshaveno prezentis tion la 26an de aŭgusto 1884.

Du jarojn post la tria kaj lasta volapukista kongreso, en 1891, Claes A. Adelsköld faris muzikon al *La espero* de Zamenhof. Tiun komponaĵon oni prezentis en la solena koncerto de la unua internacia kongreso de la esperantistoj, la 6an de aŭgusto 1905. Por tiu poemo aperis ankaŭ aliaj melodioj. El tiuj aliaj baldaŭ la plej facile kantebla komponaĵo de Félicien Menu de Ménil iom post iom eliminis la melodion de Adelsköld, kaj iĝis konata kiel la himno esperantista.

En multaj jardekoj laŭ la melodio de Menu de Ménil oni kantis almenaŭ la unuajn versojn de la poemo *La espero* en la universalaj kaj aliaj kongresoj, renkontiĝoj, festoj, kaj la publiko stare aŭskultis ĝin aŭ ankaŭ mem kantis. Sed ne malmultaj kontraŭis la ekziston de himno por la movado, precipe tial, ĉar ekstere tiu himnokantado donis sektecan trajton al la movado. Pli malfrue, kiam la patoso iel „eksmodiĝis” en ĉiu sfero de la vivo, kaj restis hejmece nur en teatra scenejo, la kantado patosa iĝis ĝena por pli kaj pli multaj esperantistoj. Ankaŭ la naiveco de la enhavo ĝenis multajn.

Malgraŭ tiuj problemoj *La espero* sufiĉe bone tenis sin dum multaj jardekoj, kaj ĝi aperis plurfoje sur diskoj. Nur ekde la sepdekaj ĝia kantado por pli kaj pli vastaj esperantistaj tavoloj iĝis ĝena, kaj precipe ekde la okdekaj jam en tre multaj esperantistaj renkontiĝoj oni intence forlasis ĝian tradician kantadon — je indigno de

aliaj, inter kiuj estis ankaŭ inklinantaj al patoso kaj mistiko — sed ankaŭ tiuj kiuj simple ŝatis muzikon...

Al la problemo de la himno apartenas la fakto, ke la poemo *La espero* ne estas tre bona (por ne diri kiĉa). Eĉ Zamenhof mem sentis ĝiajn mankojn. Li pli ŝatis la poemon *La vojo* ol *La espero*, sed malgraŭ lia peto neniu komponis muzikon al la unua. (Ne ĝi estis la sola kazo, en kiu Zamenhof montriĝis pli klarvida ol liaj samtempuloj.) Post jardekoj ankaŭ la esperantistaro pli ekŝatis *La vojon* ol „la himnon”. *La vojo* iĝis la plej ofte citata poemo de Zamenhof, eĉ dum simplaj konversacioj oni ofte citas el ĝi, kelkaj ĝiaj linioj jam estas kvazaŭ proverboj. Kelkaj nomis ĝin *la dua himno de Esperantio*. (Aliaj „la dua oficiala himno” — ili malpravas, ĉar nek ĝi, nek la unua estis oficiala.)

Tra densa mallumo briletas la celo...

Nur rekte, kuraĝe, ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda konstante frapante,
Traboras la monton granitan.

(Fotoj el Esperanta Mormonaro 3/91)



Crawford DATES



William AULD

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kas semas konstante.

Ni paŝon post paŝo, post longa laboro,
Atingas la celon en gloro.

En la lastaj jardekoj okazis multaj provoj por pli bona himno, sed neniu el tiuj vere sukcesis. Lastfoje tio okazis en Bergeno en 1991, kie la kongresanoj aŭdis muzikon de Crawford Gates kaj tekston de William Auld. Ĉu tiu estos nova „himno” de la movado, aŭ, simile al aliaj modernaj movadoj, la esperantistoj tute ne havos himnon? La „dua jarcento de esperanto” verŝajne ne bezonas himnon, kaj precipe ne la malnovan. Sed tio ne estas preciza, nur malcerta prognozo. Pli klare ni vidos post kelkaj jaroj.


Árpád Rátkai (Hungario)

(Sube vi trovu la muziknotojn kaj tekston de „La Plenumo” laŭ la eldonaĵo de Pacific Publications 1991, 911 Park Avenue, Beloit, WI 53511, USA.)


Maestoso $\text{♩} = 90 \text{ } 100$



En ĉi - u lan - do, ĉi - u ŝta - lo,
La ĉi - ma - j - ro, es - tis pra - va,
Na - ci - straj - de - la - mond', a - ten - tul




Ni a - van - gar - das - mon - don, ki - e la ho - ma - ro
Car ni ho - di - aŭ - a - mi - ki - ĝas u - nu - ling - ve en e -
En ma - te - ri - ĝo de la mon - do, ni - a - ar - da flam' ne -




de - di - ti - de kaj de - fi - e. Tro - vi - ĝas la ko -
dis - vol - vi - ĝis la re - a - lo; Ne - va - na es - tis
Pa - ca kun - la - bo - ro e - bias, Sen om - broj de su -



ĉi - e, Pa - ro - los sen - ka - te - ne en ko - mu - no
ga - lo, Kaj sper - tas ju - bi - lan - te ple - nu - mi - ĝon
fe - bias, Sed lu - mas jam kon - stan - te ki - el sig - no



nan - toj de l' ko - mu - ni - ki - lo ho - ma:
fil' de l' pi - o - ni - roj kaj mar - ti - roj,
spek - to, ne - kom - pren' kaj vort - ob - sta - klo:



1.2. I - di - o pi - ma - rit.
de l' as - roj
de l' mi - ra - klo:

Teorio

Kial Semajna Bulteno fiaskis?

la ĉi sekva analizo aperis en la lasta, adiaŭa numero de Semajna Bulteno. Ni esperu longe ne legi tion pri *Eventoj*.

Surfacaj kialoj:

- problemo trovi regulan kunlaboranton dum someraj monatoj,
- tempomanko de la redaktanto kaj presanto,
- ne-reatingo de la iama granda abonantaro. Super certa kvanto da abonantoj en Danlando (ĉar SB estis eldonita tie) la eldonaĵo ricevintus signifan sendo-kosto-rabaton.

Tamen, pli grandaj estas la **profundaj kialoj**:

- por ĝustigi al si mem la redaktoro difinis celaron: restarigo de poŝte akceptata gazeto, regula **semajna** eldonado, varia enhavo pri, kaj poresperanta, kreado de diskutforumo por individuoj kaj lokaj grupoj, perado de intergrupaj informoj. El tiuj celoj estis atingita la reguleco (dum ok monatoj) kaj la varieco, t.e. la redaktanto-dependaj celoj,
- ne bone funkciis la "forumo", kaj la redaktanto devis skribi tro multajn artikolojn

mem, aŭ publikigi materialon sen elekto (pro tio kelkfoje longaj varbecaj tekstoj),

- nur ĝis certgrade funkciis la intergrupaj informfluo (partoprenis nur 4-5 lokaj grupoj, ĉefe el FRG kaj Svedio), precipe seniluziige estis la praktika nekunlaboro de grupoj, kiuj buŝe aprobis la komunik-ideon.

- DEA (Dana Esperanto-Asocio) rifuzis kunlabori pro lokaj historiaj kaŭzoj, kvankam estis proponita je prezo de cirkulero sesfoje jare (aŭ pli ofte se dezirata) kun la cirkuleroj mem sendi la tutan bultenon. La rifuzon eblas "kompreni", sed ĉiukaze estas seniluziiga fari ion sur dana kampo kie multaj danoj ne volas kunlabori.

- Kiom da homoj eblas servi per SB? Jes, SB plej rapide informis, sed bedaŭrinde temis ĉefe pri novaĵoj, kiuj malrapide malnoviĝas (renkontigoj post kvar monatoj k.s.) aŭ tute ne malnoviĝas (fakaj, pritemaj artikoloj). Personaj aŭ grupaj informoj plue fluis letere aŭ tute ne, kaj informoj "kun limdatoj" ne atingis SB, sed malaktualiĝis atendante la aperon de *Esperanto* aŭ *Heroldo*,

- kaj finfine, kiel scii, ĉu oni servis, se oni ne amase plendas pli malfrua aŭ eĉ ne-apero? Do, se neniu eblas servi per la specifa eco, la AKTUALECO, kion fari?

*Eckhard Bick, redaktinto
(el Semajna Bulteno)*

Demandoveke tra la Manifesto

La "Raŭma Manifesto" (publikigita en la 1-a n-ro de *Eventoj*, marto(1)-92) fakte levas pli da demandoj ol ĝi kontentige respondas. Ni do starigu la demandojn por via persona medito aŭ eĉ grupa diskuto. Viaj skribaj reagoj bonvenas.

Krizo de identeco

1. Kiomgrade vi mem kredas, ke esperanto devus iĝi la dua lingvo por ĉiu?
2. Kiomgrade vi opinias, ke la esperantistoj kredas tion?
3. Kiomgrade vi mem kredas, ke ĝi efektive atingos tiun lokon?
4. Laŭ via supozo, kiam plej frue tio povos okazi?
5. Ĉu vi persone sentas frustracion pri la malrapida progreso de esperanto al iu fina celo? Kiel tio influas vin?
6. Se jes, kiuj estas la simptomoj kaj sekvoj de tio?
7. Ĉu vi konsentas, ke la movado kolektive suferas krizon de identeco?
8. Se jes, kiuj estas la simptomoj kaj sekvoj de tio?
9. Elpensu aliajn formulojn ol la celo "esperanto la dua lingvo por ĉiu", kiu povus ĉu anstataŭi tiun, ĉu prezenti pli atingeblajn antaŭŝtupojn al ĝi.

Kritiko de prceloj

1. Kiomgrade esperanto devas konkurenci kontraŭ la angla?
2. Kiomgrade la esperantistoj devus batali kontraŭ ĝi?
3. Kiel indus sinteni al ĝi kaj al iu ajn uzo de nacia lingvo por internacia komunikado?
4. Kiomgrade la Manifesto pravas, ke la rolo de la angla ne ĝenu nin?

5. Kiomgrade ni rezignu pri la oficialigo de esperanto en la 90-aj jaroj?

Niaj celoj

1. Kiomgrade vi konsentas, ke la kvar donitaj valoroj de esperanto estas la ĉefaj?
2. Ĉu vi aldonus aliajn valorojn?
3. Ĉu la propedeŭtikan valoron vi elstarigus pli ol aliaj edukaj valoroj?
4. Kiuj estu la esencaj elementoj de tiu nov-tipa internacia kulturo, kiun ni devus heroldi?

La kongresoj

1. Kiomgrade vi konsentas pri la graveco de kongresoj?
2. Kiomgrade vi konsentas, ke ili prezentas la ĉefan vojon al kresko?
3. Kion alian vi listigus apud aŭ super kongresoj, kiel akceliloj al kresko?
4. Ĉu streboj por la uzo de esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, ne estas fakte apliko de la slogano "esperanto la dua lingvo por ĉiu"?

La finaj kredoj

1. Ĉu vi samoponias, ke la unua jarcento pruvis ĝian taŭgecon esprimi ĉion?
2. Kiom ni en la okdekoj la jardeko de la Manifesto kreis kulture valoran kaj originalan? Komparu ĝin kun pli fruaj jardekoj.

La Manifesto entute

1. Kun kio en la Manifesto eblas plenkore konsenti?
2. Kun kio vi volus akre malkonsenti?
3. Kun kio oni povus modere konsenti, sed kun piednotoj?
4. Kiel la aplikistoj kaj la finvenkistoj trovu komunan terenon, kaj kia estus tiu agad-tereno?
5. Kiel harmoniigi la desupraĵajn oficialigajn kampanjojn kun la desubismaj kulturaj kulturaj iniciatoj por ke ili provu minimume kunekzisti.

*Stefan MacGill
(laŭ IPR 1/91)*

Vizito = apliko

Ĝenerale, ŝanco por apliki esperanton mankas al esperantistoj en disvolvigantaj landoj. Pro la malalta laborenspezo ili ne povas partopreni la UK-n, ne povas ĝui internaciajn renkontigojn, entute ne povas vojaĝi eksterlandan. Plejparte ili neniam kontaktas alilandan esperantiston. Tio signifas, ke la ĉefa celo de nia lingvo neniam realiĝas por ili. Ne sciante kiam ili uzos la lingvon, multaj homoj perdas la fidon kaj intereson al esperanto. En superaj lernejoj en la urbo Urumĉi (Ĉinio), oni okazigis kvin kursojn, en kiuj lernis pli ol 200 studentoj. Sed nun restas nur 3 studentoj laborantaj je esperanto.

Nature, oni povas paroli esperante kun samlandanoj, sed tio ne montras la sencon de esperanto; kaj oni povas korespondi kun eksterlandaj samideanoj, sed por nemalmultaj homoj la afranko estas multekosta. Ekzemple en Vijetnamio poŝtmarko kostas 15-onon de la meza monata salajro.

Por tiuj esperantistoj, la vizito de alilanda samideano estas unika ŝanco uzi la lingvon. Ili ĝuas grandan plezuron pro la lingva praktiko. Bedaŭrinde multaj esperantistoj ne volas viziti la lokajn esperantistojn estante alilande. Ĉar ili jam multe spertis Esperantujon, tia simpla kontakto jam ne emociigas ilin, ne logas ilin. Tia afero signifas por ili nur ekstran ŝarĝon, kiu malpliigas ilian tempon turisman kaj ripozan. Eĉ oficisto de UEA konfesis, ke li ne volis serĉi esperantistojn lokajn kiam li troviĝis ferie en Delhio (Hinda Unio). Li "fuĝis de ili", ĉar li "volis iom ripozi ekster la movado kaj iom ripozi ekster la movado kaj iom eĉ for de la lingvo".

Sed ni devas ĝuste taksii tian kontakton inter eksterlanda esperantisto kaj loka samideano. Ĝia utilo estas neignorebla. La ĝojo kaj plezuro produktita de la lingva praktikado vekas homan intereson kaj entuziasmon al la movado, kaj stimulas altigi la lingvonivelon. Samtempe vidinte, ke nia lingvo estas utila, pli multaj homoj eklernas esperanton, dum lokaj samideanoj povas forigi la dubon kaj nefidon de neesperantistoj, kiuj opinias nian lingvon senvalora.

Estu klare, ke vizito de la alilanda esperantisto ne estas almozo al la loka samideano, sed kontribuo al la esperanto-movado kiel tuto.

*Liu Xiaozhe (Ĉinio)
(el Esperanto, 6/91)*

Anhui-a Junulara Esperanto-Asocio ofertas siajn servojn:

AJEL sub patronado de la Anhui-a Provinca Federacio funkcias libroservon, edukado-servon kaj turisman servon. La asocio:

- havas profesiajn ĉiĉeronojn en lingvoj esperanto, korea, angla, japana kaj franca,
- aranĝas vizon turisman,
- mendas flugbiletojn kun specialaj esperantista rabato,
- komercas internacie,
- ŝatus konatiĝi kun similaj entreprenemaj asocioj, movadaj entreprenoj.

*WANG Xigen, Shitai-xan, Ren-shi-ju,
ANHUI, CN-245 100 Ĉinio*

Tel: +0551-252 430,

Telekso: 90011 AHFTB CN,

Telefakso: 0551-254 380

Faka aplikado

Por ekkoni la rondon familian

Geneologio estas scienco, kies celo estas esplorado pri la deveno de parenceco de familioj aŭ gentoj. Kutime homoj konas la naskiĝ-datojn nur de siaj gepatroj kaj geavoj, sed kelkaj homoj sukcesas trovi informojn pri multaj, eĉ pri 1000 antaŭuloj. En ĉiu generacio la nombro de antaŭuloj duobliĝas: 2, 4, 8, 16 je la 4-a, kaj 1024 je la 10-a generacio de antaŭuloj.

Oni povas prilabori genealogian tabeloj (arbron) de sia gento. Gento estas posteularo de unusama praulo. Antaŭulo vivinta ĉ. 1750 povas havi ĉ. 200-400 nuntempe vivantajn posteulojn en viraj linioj uzantaj la gentan nomon kaj kelkajn milojn da posteuloj en virinaj linioj portantaj aliajn nomojn. Kutime oni konstruas genealogian arbon nur en viraj linioj. Ĉiu gento rajtas posedi gentan blazonon. Blazonoj devas diferencii unu de alia. La scienco pri blazonoj nomiĝas heraldiko. Ekzistas kelkcent miloj (eble eĉ milionoj) da blazonoj en la mondo. Blazonojn posedas familioj

burĝaj, kamparanaj kaj nobelaj (ankaŭ urboj, episkopoj, papoj). Ĉiu gento, kiu ankoraŭ ne posedas blazonon, rajtas ĝin prilabori kaj uzi por ornamaj vizitkartoj, leterpaperojn, invitilojn, ktp.

Multaj gentoj estas internaciaj. Nuntempe vivantaj idoj de la komuna protopatro vivanta antaŭ kelkcent jaroj loĝas en diversaj landoj kaj parolas diversajn lingvojn. Ili povas komune esplori sian historion, organizi gentajn muzeojn, gentajn gazetojn. Esperanto povas esti tre utila por tiu celo.

Inter esperantistoj estas jam pluraj fervoraj geneologoj. Ili projektas fondi Esperantistan Genealogian kaj Heraldikan Federacion, kies celo estas informi esperantistojn pri geneologio kaj geneologojn pri esperanto. Oni planas eldoni en esperanto genealogian bultenon, organizi geneologiajn seminariojn kaj eldonadi fakliteraturon en esperanto.

Pliajn informoj ĉe:

s-ro Charles M. Hall, P.O.Box 21346, Salt Lake City, Utah 84121, Usono

s-ino Ilona György, Széchenyi u 18, H-2230 Gyömrő, Hungario

s-ro Edward Wojtakowski, Box 312, PL-50-950 Wrocław 2, Pollando.



Charles M. Hall (Usono)

Familia Esplorado

Kia rilato estas inter geneologio kaj la religio? Laŭ la instruoj de la Eklezio de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, devas ekzisti interrilato por klarigi la grandajn sumojn da mono elspesitajn ĉiujare por kolekti geneologiajn registrojn. Kia rilato? Jen kelkaj kredoj de Mormonoj:

1. La tuta homaro spirite vivis antaŭ ol veni al la tera vivo.
2. Ni venis ĉi tien por ricevi mortontajn korpojn.
3. Post nia morto ni releviĝos same kiel Jesuo Kristo releviĝis.
4. La ekzistantaj, -intaj kaj -ontaj familioj surteraj povas esti unuigitaj post la morto.
5. Dio donis al apostoloj la aŭtoritaton realigi terecajn ritojn, kiuj ankaŭ validas en la ĉielo. Li donis tian aŭtoritaton al la hodiaŭaj apostoloj, same kiel la antikvaj. Ili rajtas realigi edziĝceremoniojn surtere por ke tia edziĝo valigu post la morto.
6. Ĉar ne ĉiuj havas la saman ŝancon koni la veron de ĉi tiuj leĝoj kaj principoj dum la surtera vivo, ili necese ricevu la ŝancon post la morto.
7. Ĉar la ceremonioj de edziĝo, baptado kaj aliaj estas terecaj ceremonioj, estas necese, ke mortemuloj realigu la samajn ceremoniojn por la mortintoj.

Tial la Mormonaro serĉas la nomojn, datojn kaj aliajn informojn de specifaj individuoj, kiuj antaŭe vivis surtere.


Pro tio, oni ofte vidas, ke la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de Lastaj Tagoj sendas fotistojn kaj aliajn fakulojn al multe da

lokoj en diversaj regionoj de la mondo por kopiaj registrojn kaj aliajn dokumentojn, kaj ankaŭ alporti almenaŭ po unu kopio al Sallaga urbo por aldoni al la grandega biblioteko de generacio, kiu troviĝas en la administra centro de la eklezio. Kutime okazas, ke ili ordigas kaj purigas tiajn dokumentojn por la bonordigo de la arkivoj de paroĥoj aŭ registaraj instancoj. Kopio de ĉiu filmo farita estas donacata al la koncerna organizaĵo.

Ekzemplo de geneologia esplorado jenas. Mia prapatro nomiĝis Jozef Aŭzel. Li naskiĝis en Paderborn, Germanio. Mi povas viziti la bibliotekon de Sallaga urbo aŭ unu el la filiaj bibliotekoj en diversaj urboj tra la mondo por serĉi la registrojn de Paderborn. Se mi trovas ilin, tiam mi serĉas la datojn de edziĝo, naskiĝo kaj morto de Jozef kaj lia edzino Maria. Mi poste notas tiujn informojn kaj transdonas al la bibliotekisto. La informo estas enmetita en komputilon. Post kelkaj semajnoj mi povas viziti Templon, kie nun troviĝas la nomoj, datoj kaj aliaj informoj de miaj prapatroj kaj por fari por ili la surterajn ceremoniojn kaj ritojn; edziĝo, baptiĝo kaj aliaj. Se mi tion faras, la surteraj ceremonioj kaj ritoj realigitaj de mi estos validaj por miaj prapatroj eĉ se ili estas jam mortintaj.

Se donitaĵoj pro la serĉataj personoj ne troviĝas en la menciita biblioteko, oni petu helpon per korespondado aŭ faru personan viziton al la koncerna loko.

La ekleziaj ritoj efektivitaj de miaj gepatroj kiam ili vivis sur la tero ne validas, ĉar ili estis realigitaj de iuj, kiuj ne posedis la aŭtor-



Esperanto aplikata

Kamerunia komercisto leĝe registrita serĉas kontaktojn en esperanto por importado kaj eksportado de ĉiuj varoj. s-ro Mboge Nbele J. M., B.P. 1816 Douala, Kamerunio.

27-jara estro de publik-rilata fako de ĉin-medicino opinias, ke esperantistoj devas uzi la lingvon ankaŭ por internacia komerca kaj scienc-teknika kunlaboro. Pere de li eblas dungi ĉin-medicinajn kuracistojn (akupunkturo, masaĝo, ktp) kaj altnivelajn ĉinajn kuiristojn. Wang Huai Yu 9-hao, 17-li, 2-duan, Guilin-Jie, Heping, CN-110002 Shenyang, Ĉinio.

Ĉina komercisto serĉas kontaktojn en industria kampo: Ming Jin, Shashi - Zhengxie, Jiang Jing Lu 17, Shasi, Hubei, Ĉinio.

Ĉeĥo-Slovakia firmao komercas internacie ankaŭ en esperanto per plej diversaj varoj. Firmao KOON, PS 11, CS-53701 Chrudim, CSFR.

Tanzanio: Verdula Asocio en Afriko serĉas kontaktojn: Aŭĉi Isumbelo kaj Mateso Bilimba estas zairianoj loĝantaj en Tanzanio. Krom la esperanto-movado ili estas aktivaj ankaŭ en medio-protektado. MECEZ medioprotekta organizo bezonas kontaktojn kun alilandaj samsapecaj asocioj en la tuta mondo, por interŝanĝi informojn kaj komune fari paŝojn sur internacia agadkampo. La oficialaj lingvoj estas: esperanto, franca, angla. MECEZ, P.O.Box. 22449, Dar-es-Salam, Tanzanio.

Sergej Jilejkin, pk. 14127, 660025, Krasnojarsk, Rusio, atendas leterojn de entreprenemuloj, serĉantaj komercajn kontraktojn en Siberio.

En Brno (Ĉeĥo-Slovakio) dum la internacia konferenco "Fervojo sojle al la 3-a jarmilo" (9-10. de majo 1991.) la laborlingvoj estis la angla, la ĉeĥa, la slovakia - kaj esperanto. Pliaj informoj: d-ro Petr Chrdle, VOZ - Fervoja Esplorinstituto, U Lužického seminare 3, CS-11857 Praha 1.

taton de Dio, kiun li donis nur al la profetoj kaj apostoloj de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.

laŭ *Esperanta Mormonaro* 3/1991

Mi ŝatus scii...

Estus interese scii (supra rükolo) kial ĝuste tiomgrada praulo estas mia genuopatro, kies memoron ni ididoj flegu. Ĉu li ne havis gepatrojn? Aŭ ĉu la limo estas la praktika ekkono, kio povas ŝanĝiĝi?

La gento-konscio ne nur helpus eldoni komunan bultenon kaj havi komunan blazonon, sed negoce kunlabori, kiel decas al granda familio, ankaŭ nun praktikata en kelkaj landoj.

Sed se venus nur malriĉaj parencoj por prunti kaj neniam repagi, tiam mi ne pensas pri ĝi kiel revo. Aŭ male, se inter tiom da homoj ĝustfine mi devus trovi iun riĉan onklon...

Koncerne la geneologian servon de la mormona eklezio estus tre interese scii laŭ kiuj kondiĝoj oni povas uzi la esplorservon:

- ĉu nur membroj de la religio,
- ĉu ankaŭ eksterreligiaj kaj nur se oni promesas refari la menciitajn ceremoniojn de ĝiuj prapatroj laŭ la Mormona Religio,
- kiomgradan prapatraron oni devas receremonigi laŭ la Mormona Religio,
- ĉu la servo povus funkcii ankaŭ pro simplaj scivolaj kialoj (eventuale kontraŭ pago), kaj ĉu eventuale ankaŭ esperantlingve, helpe de iu esperantisto en la eklezio?

La ĵusaj frazoj estis demanditaj ĉe la redakcio de Esperanta Mormonaro, sed ankoraŭ ne veris respondo. Kiu scias certajn informojn pri ili? Viaj leteroj estas bonvenaj.

Movado

Joachim Werdin

Novaj landaj asocioj en Azio

En la pasintaj tri jaroj rezulte de prelegvojaĝo de Joachim Werdin en Azio laŭvice ekestas ĝermoj por novaj esperanto-klubo. Li raportas:

Ekvojaĝante mi ne sciis, ke poste mi decidis dediĉi mian tutan energion, tempon kaj monon al evoluigo de la esperanto-movado en Azio. Kial? Ĉar mi konstatis, ke tie multaj homoj volas lerni la lingvon, ekciinte pri la ideo, kaj ke neniu instruas ilin. Ĝuste kompari tion oni povas al fekunda kamparo sen semanto kaj zorganto.

Konsiderinda esperantista aktivado ekzistas en Koreujo, Ĉinujo, Japanujo, Irano, Israelo kaj Vjetnamujo. En Baharato (Hindujo), Nepalo, Pakistano, Malajzio, Singapuro, Tajvano kaj Tajlando funkcias malfortaj organizaĵoj, kiuj bezonas helpon edukon kaj ofte materian. En la ceteraj Aziaj landoj, eĉ se tie loĝas esperantistoj, ekzistas nenioma aktivado. Nun mi planas daŭrigi la laboron por evoluigo de la movado en Honkongo, Tajlando, Makao, Filipino, Indonezio kaj pluraj aliaj aziaj lokoj. Tiuj planoj inkluzivas ne nur lokajn, korespondajn kursojn je diversaj

nivejoj sed ankaŭ i.a. eldonon de lerniloj kaj edukadon de aziaj esperantistoj en Eŭropo. Sed estas grava kondiĉo la financa flanko de la planoj devas funkcii. Bedaŭrinde tio nun konsistigas plej grandan obstaklon.

Vere, multo estas farebla, farinda kaj eĉ farenda. En Azio ekzistas granda (preskaŭ tute ne utiligita) potencialo por la esperanta movado. La ŝanco diskonigi la lingvon kaj uzigi homojn pri ĝi estas tre esperiga. Tio estas konkludo bazita je miaj spertoj pri konkreta laboro por evoluigo de la movado en Azio. Donacoj povus helpi pri ekzemple ekfunkcio de novaj esperantaj kursoj, organizaĵoj, ktp.

Kontaktadreso: Joachim Werdin, Pionerów 6A 9, PL-47-220 Kedzierzyn, Pollando.

En la marto(1)-92 n-ro de Eventoj estis publikigitaj la adresoj de kelkaj subtenindaj asocioj.

Kiajn kampanjojn subteni?

Bedaŭrinde mi ne povas esti certa, kaj per tio eble mi faras malpopularan paŝon. Ne ĉar mi ne ŝatus la disvastigon de esperanto en ĉiuj landoj. Kampanjoj ne sufiĉe zorge pripensitaj, realigitaj eble ne atingas la deziratan efikon, foje eĉ la malon. Mi ne miras, ke esperantistoj kiel naturaj internaciistoj ŝatas revii pri pli kaj pli da landoj, kiuj "kunlaboras", eblas mencii ilin en diversaj statistikoj. Sed estus malhoneste nur pro tio uzi kelkajn komencantojn kiel pupojn. Estas malhoneste gustumigi al ili ion, kaj poste ne kapabli nutri plu antaŭ ol ili povus stari sur propra piedo. Ni nepre ne forgesu

Azian (kaj aliajn kontinentojn), sed per zorge pripensitaj kampanjoj. Mi pli forte ŝatus meti en fukuson ekzemple (eks)Sovetion, Siberion, se ankaŭ paroli pri Azio. Tie jam de la zamenhofaj tempoj vivas altnivela sed tre malriĉa movado dum longa tempo izolita en internan "enmigradon", eĉ se ili ne fanfaronas pri tio. Ili JAM NUN povus esti integra parto de la tutmonda movado, se ili ricevus iom da financa helpo, ekzemple aboni revuojn, aŭ eĉ simplan poŝtkoston, ktp.

Se meti prioritaton al pli urĝe bezonata investo kiu plej efike profitigas, tiam mi metus akcenton unuavice al la jam ekzistantaj strukturoj. Se esti iom kruela (kiun mian fingron mi mordu?), kie ankoraŭ estas nenio, ili eltenas ankoraŭ kelkajn jarojn. Se iu jam aktivus, tiu estu subtenata, sed ne estu kreataj strukturoj kiuj ne estos poste nutrataj. Interesiĝo kompreneble estas granda (kaj tio foje kortuŝas la okcidentan oreilon, ĝar propralande oni malfacile povas vekigi intereson), ĉar malriĉulo pretas fari ion ajn por kontakti riĉulojn esperante de ili helpon ne nur (aŭ unuavice ne) movadan.

S.H.

Mallonge

En *Internaciisto* (organo de Kolektivo Esperantista Komunista) raportas Ruddy FERNANDEZ, klubprezidanto por la agado de la esperanto-grupo "Pli da lumo" en Kubo. Ili havas problemojn: mankas al ili esperantaj materialoj, eldonaĵoj. La okazigo de Universala Kongreso kirlas la akvon de la enlanda movado, precipe tio estas unu el la ĉefaj celoj kongresi en nefortmovadaj landoj. Ĉu ni lasos la kirlitan akvon putri? Esperanto-klubo "Pli da lumo", Gaveta Postal 2, Santiago de Las Vegas, 17200 Ciudad Habana, Kubo.

Ukrainio: En la kadro de kampanjo por ŝanĝoj de stratnomoj ankaŭ en Ukrainio la lokaj esperantistoj proponis en urbo Ternopil doni al strato la nomon de Mihail Jurkin, aŭtoro de la unua lernolibro de esperanto por ukrainoj en la jaro 1907.

Aŭstralio: en germana filmo "Marleneken", kiun prezentis aŭstralia televido SBS, unu el la aktoroj diris en esperanto "Bonan tagon, kara fraŭlino, vi plaĉas al mi". Sekvis nacilingvaj klarigoj.

Satelita televida programo *Music TV* plurfoje, (ekzemple je 23.55 MET la 26.01.92) dissendis skriban anoncon, kun ebla teksto *Familia Esperanto...* pliaj detaloj ne estas konataj. Se iu scias pli, informu la redakcion de Eventoj.

Benina Esperanto-Asocio, B.P. 04-0421, Cotonou, Benino, eldonis kvin mil ekzemplerojn da francilingvaj varbilaj kaj dissendis ilin tra la lando.

En hungara vilaĝo Szank (H) du veteranaj esperantistoj Stefano Bálint kaj Francisko Berta en la loka kulturcentro la 29-an de februaro aranĝis esperanto-forumon dum la inaŭguro de esperanto-kolektaĵo de Stefano Bálint, sur 30 grandformataj vitraj tabeloj. Kantis popolkanta koruso gvidata de s-ino Júlia Herbály. La ĉefa plano de la loka klubo estas instrui esperanton al lernantoj.

Esperanto en lernolibro de elementa lernejo

Lernolibro por la sesa studjaro de elementa lernejo en la Korea Respubliko enhavas kvarpaĝan artikolon pri esperanto.

23. leciono,

NI UNUIGU LA MONDON

Estus tre maloportune, se ni ne povus interkomunikigi unu kun la aliaj. Tian kazon ni ofte spertas, kiam ni renkontiĝas kun fremduloj. Kiel oportune estus, se alinaciaj homoj en la mondo uzus unu komunan lingvon! La lingvo esperanto estis naskita de tiu ideo.


Esperanton kreis kaj publikigis d-ro Zamenhof, la lingvisto kaj okulisto, en la 14-a tago de julio 1887, kaj ĉirkaŭ ses cent mil homoj en la mondo uzas ĉi tiun lingvon.

Zamenhof naskiĝis en malgranda lando situanta ĉe la bordo de Balta Maro en Nord-Eŭropo. La lando siatempe estis aneksita kaj altrudita de Rusio, kiam Zamenhof naskiĝis. Tial tie loĝis diversaj gentoj intermiksita, nome rusoj, germanoj, judoj kaj poloj.

La lingvoj tie uzataj estis ne unu, sed multaj, kaj tio donis al la popolanoj grandan konfuzon. Zamenhof, kreskante de sia juneco en tia cirkonstanco, ĝisoste sentis maloportunecon de la multlingva uzo ekde sia infaneco.

Iun tagon, ĉe la juda butikoj okazis bagatela kverelo inter judo kaj germano pro la malbona interkomunikigo. Venis rusa policano kaj kriis, Parolu en la rusa lingvo, uzu nur la rusan! Kontraŭ tio la polo protestis: "Fi, ĉu tiu ĉi loko apartenas al Rusio? Jen ni loĝas en Pollando!"

La rusa policano arestis la polon kaj fortiris. Ĉe tio la judo, ofte persekutata de la poloj, diris



al si, la policano ne plu povos insulti nin. Tion aŭskultante koleris la poloj, tamen rusoj rigardis kun mokaj ridoj. Tiel serioza estis la konflikto en la regiono pro la uzo de malsamaj lingvoj.

Mi lernis, ke ĉiuj homoj estas gefratoj, tamen fakte mi vidas kontraŭaĵojn en realeco. Mi certe faras ion en plenaĝo por solvi tian malfeliĉigan problemon... Zamenhof, estante ankoraŭ juna, jam ekinteresiĝis en la aferoj por paco kaj homaro.

Por amikiĝi unu kun aliaj popoloj, oni devas transsalti la muron inter la popoloj! Kaj por tion fari antaŭ ĉio oni devas uzi la saman komunan lingvon.

Tiel pensinte li lernis multajn lingvojn kaj studis por krei internacian lingvon en la nomo de Esperanto, kiun li studis ekde mezlerneja tempo.

Ni unuigu la mondon!

Lia amo al la homaro disvastiĝis en la tuta mondo pere de homoj, kiuj amas kaj uzas Esperanton dum pli ol cent jaroj, esperantistoj ĉiujare celebras lian naskotagon, la 15-an de decembro.

La amo de Zamenhof al la homaro por unuigi la mondon eterne restos viva en la mondo.



Arangoj

Germana Katolika Konferenco
17-21 de julio 1992, Karlsruhe

Tiu nemovada, faka konferenco havos nuntempe modan temon "Eŭropo".

Ĝi havos esperant-lingvan sektion, kiu povas organizi propran diskutrondon en kaj pri esperanto, informstandon, esperant-lingvan diservon kaj eble eĉ esperant-lingvan koncerton.

Eksterlandaj esperantistoj ankaŭ estas kore invitataj. Por gejunuloj el reformeŭropaj landoj eble estos senpaga partopreno en amasloĝejo aŭ ĉe privatuloj kaj unu manĝo tage.

Pliaj informoj ĉe: Michael Könen, Berliner Freiheit 13, D-W-5300 Bonn 1, Germanio.
tel: +49/228/695665

1-a Pekina Internacia Simpozio pri Aplikado de Esperanto (PISAE),
09-15.05.1992

Aliĝkotizo: 55-110 USD laŭ landoj de la aliĝanto. Pri restadkosto, eventualaj karavanoj, detala programo kaj aliaj sciindaĵoj informas: Organiza Komitato de PISAE ĉe Pekina Esperanto-Asocio, P.O.Box 1089 Beijing, CN-100034, Ĉinio.

5-a Pacifika Kongreso de Esperanto
17-22.08.1992, Qingdao, Ĉinio

Aliĝkotizo: por ĉinoj 200 RMB, triamondanoj 30 USD, ceteraj landoj 60 USD. Gejunuloj ĝis 26 j. kaj handikapuloj ricevas 50% rabaton.

Pliaj informoj ĉe: Pacifika Kongreso de Esperanto, Hotelo Hungjai, 75, Yan-an Yi Lu, CN-266003, Qingdao, Ĉinio.

Bicikla Karavano al la Pacifika Kongreso

Laŭ ĉina proverbo tri homoj pli fortas ol tigro. Tial la iniciatinto serĉas kunvojaĝantojn al bicikla karavano 1200 km-a kaj 15 taga de Shanghai ĝis Qingdao. Unika travivaĵo por aventuremuloj! Ne timu 5-6 horan bicikladon tage en ekzotika medio, lando de bicikloj. Jam nun ekzercu vian poŝtaĵon, sed ne troigu. Ne forgesu la esperantan proverbon "Biciklante poŝtagmeze, doloros la poŝtaĵ' meze".

Organizas: Tang Yong, Buzhen 2nd primary School, Chongming, Shanghai, 202157, Ĉinio.

7-a Junulara Festivalo de esperantaj poezio kaj kanzono
01-03.05.1992, Bydgoszcz, Pollando

Partoprenantoj estu lernantoj kaj studentoj ĝis 22-jaroj. Du kategorioj: recitado kaj kantado. Aliĝi eblas en ambaŭ fakoj po du pecoj, 4-6 minutaj. Por kantantoj muzika ensemblo disponatas. Partoprenkotizo: 50 NLG.

Org: Zespół Szkół Handlowych, ul. Kaliska 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Hungarlanda Esperanto Deklamkonkurso
11-12.04.1992, lastminute! telefonu: +36/89/24-896, József NÉMETH, Nagy László Általános Iskola, H-8500 Pápa, Anna tér 1. Hungario.

Kvar kategorioj: 6-10, 10-14, 14-18 jaraĵoj kaj plenkreskuloj. Dimanĉe ekskurso.

47-a Internacia Junulara Kongreso, 1991, Karlskoga, Svedio

Ek al kunkantado

Proksimiĝante al venontaj kongresoj denove povas fariĝi interesaj la raportoj pri pasintaj kongresoj, jam ne pro freŝeco, sed veki apetiton por la venontaj, pentrante etosajn bildojn pri la pasintaj. Kaj nelastvice doni legajon al tiuj multaj, kiuj certe ne partoprenis (kaj -os) ĝin.

Laŭ la antaŭkongresa famo de la internacia esperanto-kongreso en Karlskoga, ĝi estos eksterordinare multekosta en neimageble multekosta lando. Eble tial al ĝi aliĝis ne tiom multaj okcidentanoj kaj tiom malmultaj orienteŭropanoj, entute 180 gejunuloj el 35 landoj. Venis nur ses poloj el trideko da aliĝintaj, nur unu hungaro, eĉ ne unu bulgaro. Aliflanke venis japanoj, koreoj, tajvananoj, pakistananoj, kaj eĉ pli ol dek civitanoj de tiam ankoraŭ ekzistanta Sovetio.

La kongresejo estis la popolaltlernejo de Karlskoga, unu el tiuj imitindaj nordiaj klerigaj institucioj, kiu cetere estas vere taŭga por internaciaj kongresoj.

Ve, iom malpli sukcesa estis la antaŭpreparita kongresa programo, malgraŭ brilaj Amplifiki kaj Persone, kiuj denove montris ke ili estas numero unu inter esperanto-rokgrupoj. Nu, pri la mankoj oni certe ne kulpigu la organizantojn. Kiom mi scias, ili devis okupiĝi pri la kongreso sole pro tio, ke pli spertaj aktivuloj rezignis. Nek vere helpis TEJO, kies kongreso tio ja estas. Fakte, kelkaj truoj kaj prokrastoj ne tre ĝenis, almenaŭ nin, sovetianojn. Estis simple plia temo por la konversacioj kaj ŝercoj.


Unika amaso da sovetianoj

La menciitaj sovetianoj (mi devas uzi terminon pro la manko de io alia) unuafoje venis al okcidenta IJK en tiom forta kaj laborkapabla konsisto. Dum longa tempo la esperanto-mo-

vado estis izolita kaj evoluanta tute memstare. Tiu plejparte junulara movado estis verŝajne ne malpli amasa ol la "tutmonda" kaj ne malpli (aŭ ĉu eĉ pli?) vigla. Interalie, sovetiaj junularaj esperanto-renkontiĝoj baziĝas sur aliaj principoj, ne tute kongruaj kun tiuj de IJK, kaj verŝajne pli kongruaj al tiuj de la okcidenta skolta movado. Por ĝisosta sovetia aktivulo ne ekzistas pli granda plezuro ol ie post noktomezo kolektiĝi ĉirkaŭ lignofajro aŭ almenaŭ ĉirkaŭ varma tekruĉo kaj kanti, kanti, kantadi. Ĉiu nia aktivulo parkere scias dekojn kaj dekojn da esperanto-kantoj - plej ofte originalaj. Kaj bona esperanto-kantisto estas por li kara, ne malpli ol Nia Majstro.

Do, en Karlskoga kien bonŝance venis kelkaj famaj sovetiaj esperanto-bardoj - junaj sovetianoj rapide trovis lokon por sia kant-rondo, kaj ĉiunokte tie sonis la kantoj. Dume okcidentanoj laŭ sia okcidenta maniero kunvenadis ĉirkaŭ tabloj de la kafejo kaj babilis - kaj miris pri ni! Iom post iom niaj ambaŭflankaj kontribuoj integriĝis en la ĝeneralan etoson. Oni en-sorĉiĝinte aŭskultis Ĵomarton, ĥore persvada-dis unu nian tre modestan kamaradon kanti *Idealon*, kaj Andrej Obrezkov baladumis - en plena silento. Sonis multaj komunaj kantoj, ne nur niaj; *Sola, sola, so-o-ola!!!* kunkantis unu-anime la centkapa anaro. Ankaŭ la sovetianoj - kaj vere tutkore.

Garik Kokolja
(el revuo Esperanto)



IJK-PARTOPRENANTOJ EL EŬROPO! Anstataŭ sendi ĉekon aŭ poŝtmandaton al Kanado por kotizi al IJK, vi ankaŭ povas transĝiri la ekvivalentan sumon al la belgia poŝtĝirkonto 000-0035520-180 je la nomo de FLEJA, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, kun indiko "IJK"



16- Internacia Junulara Festivalo
15-21-a de aprilo 1992,

Adreso de la festivalejo: Soggiorno Montano di La Salle, I-1105 Franzione Pont (AO), Italio, Tel: +39/165/861190. Troveblas en Nordokcedenta Italio, atingeblas per buso de Aosta. Aosta atingeblas buse aŭ trajne de Milano kaj Torino.

Sed antaŭe aliĝu ĉe: Enrico Agliotti, Via Pellice 19, I-10139 Torino, Tel: +39/11/374336.

Junulara Esperanto Renkonto (JER)
30.04 - 03.05.1992, Szombathely

Ejo: antikva kastelo en la verda zono de la urbo, apude lago por boati. Tranoktejoj en seslitaj ĝambroj.

Programoj (plejparte esperantlingvaj): konkursoj la tutan tagon, komputilaj esperantlingvaj ludoj, strategia ludo en la urbocentro (*kio tio estas? La red.*), esperantaj videofilmoj, bufedo 0-24 kun esperanto-biero, erotikemaj prelegoj, esplorado de flauro, kaj la pinto (devus esti) por HEJ-membroj: jarkunveno.

Partoprenkotizo: por enlandanoj, HEJ-membroj 1992 HUF, vojaĝsubvencio 300 HUF por pli ol 300 km-uloj, por enlandanoj ne-HEJ-membroj 2650 HUF (petu informilon pri HEJ-membrigo sen aglimo, kotizo tre favora).

Por eksterlandanoj 70 DEM ĝis 20.04.92, 80 DEM ĝis 29.04, surloke 90 DEM. Rabatoj por gejunuloj ĝis 27 jaroj 10 DEM, ĝis 19 jaroj 20 DEM malpli en ĉiuj kategorioj.

Pliaj informoj:

Tinger Tünde, Magyar u. 1, H-9700 Szombathely, Hungario

Literaturo

Legi ĉion – kvante eblas, sed kiel havi ilin?

Ĝenerala malfacilo je tutecaj pritaksoj de la esperanto-literaturo, el kiu ajn vidpunkto, ĉiam estas la preskaŭ-neeble havi vastan tragardon pri la materialo. Laŭ la kvanto, esperanto-literaturo devus esti unu el la plej "ellegeblaj" literaturoj de la mondo (ekz., la pli-malpli 100 romanoj digestebles sen-

Pri la nuntempa esperanta literaturo

♣ kaj ties kritiko ♣

probleme dum kelkaj jaroj) sed la misoj pri informado, malfruoj kaj ofte ĉefe (trans)pag-problemoj kaŭzas, ke literaturemulo devas esti persista en siaj serĉadoj, malgraŭ ofta frustrigo. Samkaŭze, preskaŭ iu ajn tezo pri "bazaj tendencoj" povus esti pravigebla, aŭ pro la nur partaj konoj de la elcerbuminto, aŭ pro lia fido je necesa duonkulturiteco de la legontoj.

Premisinte tion, mi plu senhonte. Jam la demando-duo sugestas, ke lastatempe en nia beletro (estu premisita ankaŭ, ke en mia pritakto literaturo kaj beletro samas) la rakonta prozo atutis, almenaŭ superis aliajn ĝenrojn. Kaj ŝajnas esti tiel. La produkto kreskis kvante. Kio, laŭ vulgarmarksisma tezo (sed ĉi tie akceptebla) devas naski pli-malpli frue kvaliton. Tiu kvalita salto jam okazis, dank' al libroj aperintaj laŭlonge de la 80-aj jaroj (ofte verkita antaŭe): fenomeno jam analizita de Osmo Buller kaj Vilmos Benczik, i.a. La suproj de tiu roman-tajdeto por mi persone estas. "La litomiŝla tombejo" de Piĉ, "Adolesko" de Vaha, "Ombro sur interna pejzaĝo" de Stimec, "Regulus" de Lorjak kaj "Sed nur fragmento" de Steele. Tamen, tiuj romanoj neniel superas la nivelon de averaĝa romano en etnolingvo, krom per lingvaj meritoj netradukeblaj aŭ eventuale per temo, kiun — tiel — nur esperantlingva verkisto povas trakti. Pri kio temas?

lo propra – temo movada kaj interkultura amo

Mi ŝatus kredi, ke fortiĝas en nia literaturo la tendenco de aŭtentaj E-romanoj: tiaj, kiuj ne povus naskiĝi aŭ ne povus estiĝi tiaj en alia lingvo. En "Regulus" nur ŝercaj aludoj pri SAT (Sennaciecia Asocio Tutmonda) kaj UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) reprezentas esperantan fonon (tio ja ne riproĉeblas al romano pri la 17-a jarcento en Francio). Sed tiu fono de Stimec nepras, ĉe Vaha gravegas, ĉe Piĉ raportas nur, kion esperantisteco signifas inter aliaj okazaĵoj de unuopula vivo, sed Stimec revigligas tradicion de Varankin ("Metropoliteno") kaj R. Schwartz ("Kiel akvo de la rivero") kun la temo de "internacia amo" eble plej grava fenomeno en la privata vivo de esperantisto. Pli bone dirite: "interkultura" amo, ĉar en la amo de diversoriginaj gehomoj konfrontiĝas tradicioj de kulturoj diversaj.

Interkultureco tutmonde graviĝas en la temaro de literaturo (v. pri koneksaj priprenoj

prelegskizon de mi "Eŭropo kaj E-literaturo" en Bulgara Esperantisto, aprilo 1990), do per tia temelekto esperanto pioniras kaj eniras ĉefluon. Mi esperas, ke mi ne voluntarisme vidas tian tendecon en la esperanta verkaro.

Sed same gravas konstanta realudo al la esperanta kultura tradicio, asimilado de ĝi. Kaj jen, Vaha citas en sia libro el "La Infana Raso", Steele faras same, sed pli kaŝite (ne pli demandu min, kiuloke!), ĉe Stimec oni legas la "Mastron de Korboja", Kamaĉo (ĝis nun ne menciita, ĉar konata ĉefe pro noveloj) omaĝas per fajnaj aludoj jen al Fernando de Diego, jen

al Liven Dek.

Tiuj aŭtoroj vivas efektive en Esperantujo, ofte eĉ kiel profesiuloj. Tial por li esperanto estas ne nur ilo, sed ankaŭ temo. Ili metas al si demandojn pri la esperantista esto kaj ĝiaj potencioj. Ĉu ge-amo, dankebla al esperanto, kontraŭstaros la povon de tempopaso (Stimec)? Ĉu esperantistiĝo en si mem kapablas solvi la psikajn problemojn de individuo (Ulrich Matthias: Fajron sentas mi interne)? Ĉu eblas, ke esperantistoj argumentas per bomboj (Corrado Tavanti: Varmas en Romo)? Anstataŭ ĝenerale humanisma, foje dimanĉpredikeca mesaĝo (Baghy) ni havas ĉi tie vivantan literaturon pri vivanta komunumo.

Pruvo por tio estas ankaŭ, ke plifortiĝas la rilato inter verkisto kaj publiko. Ne en la plej konkreta senco: la publikan kunsidon de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio) en Rotterdamo (1988) ĉeestis apenaŭ pli da interesigantoj ol da verkistoj. Sed kiel Baghy estis ĝenerale legata sisteme, nun ni havas niajn "tutpopolajn" aŭtorojn: Nemere kaj Valano/Piron (Lorjak same meritis tion). La ĝenerala tipo de esperanto-verkisto estis kaj estas homo, kiu, pro manko de tempo/talento/eldonisto aperigas nur unu-du-tri librojn; ili, male, ĉiujare memorigas pri si. Ilia lingvaĵo facile sekveblas, kio ĉe Piron estas konscia strebo. En tiu ĉi alineo estu menciita la fungrapida diskresko de poramuza-krima-portrajna-leĝera literaturo, kiun eldonisto surmerkatis kun multe pli grandaj esperoj ol Sadlerecan aŭ eĉ Auld-an poemaron: Deck Dorval, Tavanti, Manjo Austin, Moirand...

Stabiliĝo de la literatura normo

Eble estus tro malfrue aserti, ke nunas la periodo de stabiĝo de la literaturlingva normo. Fruas, ĉar ankoraŭ Piĉ volas havi lingvon pli komplikan ("esprimriĉan"), Ŝulco pli logikan, Piron pli simplan (pli objektive dirite, malpli elitecan sintenon de la verkistoj). Malfruas, se ni pensas pri stilistoj kiel Ribillard aŭ R. Schwartz. Sed ĝustatempe, se ni konsideras la maturan stilon de "Sed nur fragmento", kie Steele priskribas, filozofias, karakterizas kaj serĉas per varia lingvaĵo, aŭ la aŭdace eksplodajn eksperimentojn de la Kamaĉo-noveloj. Ambaŭ verkistoj ĝisfunde konas sian bazon, la lingvon tian, kia ĝi estas

parolata: ĉiu vorto, kiun ili surpaperigas, situas konscie en rilato kun tiu bazo.

Traduki nacilingven – eldonistoj antaŭjuĝas

Lasta konstato ĉi rilate estu, ke — logike pli kaj pli da verkoj meritis etnolingvigon, sed tion ja ofte baras antaŭjuĝo ĉe neesperantistaj eldonantoj. En sia escepteca situacio, Hungario sukcesis apogi la tezon precipe per "leĝeraĵoj": "Varmas en Romo" de Tavanti, "Kaziniski venas tro malfrue" de Dorval, "Ŝia lasta poŝtkarto" de Elgo, "Kumeŝaŭa, la filo de gangalo" de Sekelj, plus eta dulingva antologio el nia literaturo aperis en la lastaj kvar jaroj. Pollando ĵus atutis per cent paĝoj, apud Vaclav Havel, en mondliteratura revuo.

Poezio meritis apartan pritakson. Mi kredas, ke malpli facilus konstati tendencojn en ties pli heterogena materialo. Tamen, tute ne pro ĝentileco, mi persone elstarigus la nomojn de Nervi, Carr, Berveling, Gazizi, Ungar, Huleš kaj Lozgaĉev.

Ĉu kritiko aŭ recenzo?

Ie nepras malmiksi la nociojn de kritiko kaj recenzo. En Esperantujo ili estas ĉiamaj ĝemeloj, bedaŭrinde. Recenzo unuigas en si funkciojn, kiuj normale disiĝas en etnolingvaj kulturoj: sciigo pri apero, reklamo, gazetnivela recenzo kaj literatura kritiko kunas-apudas. Tio kompreneblas, ĉar — manke de veraj librovendejoj, bibliotekoj, amaskomunikilaj rekomendoj, ktp — krom eventuala surloka libroservo kaj amika konsilo homoj ekscias pri libroj nur el recenzoj. Tiuj do devas prezenti ankaŭ bazajn informojn pri la verko, verkanto, — se temas pri traduko — kultura fono. Laŭ la ricevita eduko tre diversas la skalo de legantoj, kaj teorie necesus kontentigi ilin ĉiujn. Sed dume recenzojn ofte verkas iu ajn el la unupersona redakcio de provincaj bultenoj, kaj tial aperas galimatioj kiel propono kandidati William Hold (tiele!) al Nobel-premio (mi ne diru, kie...).

Sed de Diego kaj Silfer jam bone priverkis la postulojn de serioza literatura kritiko. Mi aldonu nur unu plendon kaj unu malplendon.

Beletron ne legas klerulo

Mi ne plu konsterniĝas aŭdi, ke ne nur unu klera esp-isto legas nek Literatura Foiro, nek Fonto nek ion ajn beletrean. Sed ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj legas nur LF aŭ nur Fonto aŭ nur ILTIS-Forumo... Tio simptomas bedaŭrindan disskoliĝon, koteriumadon, kiu rajtigas ĵusan ŝercan difinon en La Kancerkliniko pri kultura gazeto: gazeto, per kiu intelektuloj interofendas sin. (Vidu ILTIS-Forumon pri la korifeoj de LF). Tiu fenomeno foje reflektiĝas en nia kritiko, kiam ne plu gravas la kvalito de la verko, sed la nomo de la verkinto.

Aliflanke, estas ne malmultaj, kies recenzoj kaj kritikoj, funde pritraktaj, ĉiam meritis legadon: Kris Long, Fjodorov, de Diego, Kamaĉo, Usakiewicz, Korjenkov, Buller, Berveling, Hauptenthal, Ullmann, Nervi (ho ve, tro sporade), k.a. Mi ofte havas la impreson, ke kelkaj el ili, precipe el la sovetiaj kulturondoj, estas eĉ tro klare postulemaj pri nia originala literaturo (legu la utopie-simpatie kuraĝan eseon de Fjodorov: Survoje)!

István ERTL
Bulgara Esperantisto, nov.1991

Anoncetoj

Vendas T-ĉemizojn kun tekstoj en kaj pri esperanto, mendeblaj ĉe UEA, Heroldo de Esperanto, Bona Espero. Kromaj informoj haveblas: Amarillo Carvalho, Caixa Postal 1107, BR-20001 Rio de Janeiro, Brazilo.

Serio da poŝtkartoj, ilustritaj per malnovaj fotoj kaj dokumentoj pri la urbo de Zamenhof de 1912 ĝis 1929, kun priskribo en esperanto estas mendebla ĉe "Tomy", Box 351, PL-15 001 Białystok, Pollando.

Se vi volas helpi la fakan aplikadon de Esperanto, diskonigon de la ĝisnunaj eblecoj kaj rezultoj, sendu koncizajn (!) artikolojn, informojn pri ili al *Eventoj!*

Kiu havas intereson investi en Litovio, aĉeti, vendi aŭ produkti varojn, aŭ pere de ĝi en aliaj regionoj de KŜŜ (eksa Sovetio), skribu al: Litova Esperanto-Asocio, Ab.k. 167, 233000 Kaunas-C, Litovio

Kampanaro serĉas laboreman kampanaron sub la flago de esperanto, por helpi en ĉiutaga laboro. Edziĝo eblas! Kontakto per letero en esperanto: Parzival, c/o Sunhejmo, Brenden 9, CH-9424 Rheineck, Svislando.

Falĉmaŝino por tritiko kaj rizo volas konstrui Tangshan-Esperanto-Asocio. Kiu povas provizi detalan desegnon, skribu al TEA, 3 Hao Xin Xiang, Tangshan, He Bei, CN-063000 Ĉinio.

Kreaĵojn el vitro faras hobia, kaj pli kaj pli profesie, kaj serĉas samfakulojn Václav Stibor, Keletrárné 498, CS-277 13 Kostelec n. Lebem, Ĉeĥoslovakio.

Gitarkonstruisto de stiloj klasika kaj "flamenka" serĉas samfakulojn kaj ankaŭ gitarludantojn. Richard Segura, c/Pantá 133, E-08221 Terrassa, Hispanio.

Mekanikajn brakhorloĝojn virajn kaj virinajn kun surskribo "Esperanto" por 30 USD kaj tablorhorloĝojn ornamitajn "Esperanto" por 30 USD (inkluzive sendokostojn) vendas Pentti Törmälä, Domargaard, SF-06100 Porvoo, Finnlando (Tel: 358-915-148-023).



Debrecena Bulteno ses n-roj jare, pri movado, politiko en Hungario, lokaj (ne nur movadaj) okazaĵoj, enigmoj, ludoj po 54 paĝoj. Aboneblas: por hungaraj 200 HUF por 6 n-roj, por alilandanoj 8 DEM po ekzemplero, ekde 3 ekz po 7 DEM.

Ĉu vi volas instrui en Ĉinio? Nun en Ĉinio iuj universitatoj volas dungi instruistojn anglalingvajn el fremdaj landoj. Mi proponas, ke min informu esperantistoj, kiuj posedas la anglan lingvon, kaj ankaŭ instruus en ĉinaj universitatoj, plie helpus la lokan esperanto-movadon. Mi povas doni pli detalajn informojn... Wang Tianyi, ĝenerala sekretario de Xian E-Asocio, Xingyungu 74 Hao, CN-710054 Xian, Ĉinio.

Tendaraj tagoj

Ĉu viaj lernantoj estas inter 10- kaj 14-jaraj? Se jes, ILEI eldonis precize por ili novan lernolibron de esperanto!

Karlo, Adelo, Rikardo, Habibo, Aniko kaj aliaj junuloj enkondukos ilin en la lingvon kaj invitas ilin partopreni la Duan Internacian Esperanto-Tendaron. La desegnisto de *Juna amiko*, Pavel Rak, donas allogan aspekton al la verko, en kiu abundas dialogoj, komunikaj ekzercoj kaj rakontetoj.

Verkis la lernolibron Stefan MacGill.



Lernantoj aliĝaj povas uzi la verkon — plenkreskaj observantoj de tiu junulara mondo bonvenas. La libro prezentas abundon da komunik-postulaj situacioj, por ke lernantoj parolu esperanton jam de la unua leciono.

Superfluas diri, ke la lernolibro estas nur esperanta. Kvankam komunika, ĝi havas klaran gramatikan strukuron.

Eldonita de ILEI, UEA kaj la Hungara Esperanto-Junularo, la unua kajero prezentas ĉirkaŭ trionon de la esenco de la lingvo en tri-dek unu-paĝaj ĉapitroj. La kajero mem havas 44 A4-formatajn paĝojn; fine de ĝi aperas gramatika resumo de ĉio prezentita, verkita en Esperanto komprenebla al lernantoj, kiuj studis nur la enhavon de la kajero mem. Plie estas resumaj dialogoj, rol-ludetoj, rimaĵoj, ekzameno kaj skemo de la aperonta dua kajero. Baldaŭ aperos gvidilo por instruistoj kaj poste laborlibro kaj son-kaseto.

Tendaraj tagoj estas mendebla de Universala Esperanto-Asocio, je 12,00 NLG (triona rabato ekde 3 ekz.). Sekcioj, instruistoj kaj libroservoj povas dum limigita tempo mendi pli grandajn kvantojn de ILEI minimuma mendo ĉe ILEI: 3 ekzempleroj. Loĝantoj en Hungario kaj najbaraj landoj turnu vin al la hungara ILEI-sekcio, Kovács Márta, Ady Endre u. 23-25/C, H-1221 Budapest, kiu vendas ĝin kontraŭ 120 forintoj (95 Ft ekde 6 ekzempleroj).

Ĉu diskonigi vian aranĝon al internacia publiko?
Sendu koncizan informon (kun emblemo, desegnaĵo) al *Eventoj!*

Korespondi deziras

Koue-Lambou Folly, B.P. 7632., Lomé Togo-lando tm. kaj aparte rilati kun sperta e-isto por perfektigi.

Kovnator Naum, Kaiju 42-6., Liepaja 229700 Latvio tm. pri dt, precipe pri E-instruado, tradicioj, kuirarto, historio, politiko, ludoj kaj infanedukado. Kolektas bk kaj esp-afojn.

E-grupo "Alfabeto" gvid. Borisz Hanukajev, ul. Aziza Aseva pr. 4, d. 4., Mahackala-Respul 367015 Rusio, Dagestan 22 gimnazianoj, 14-17 jaraj serĉas leterkontaktojn kun diversaj partoj de la mondo.

Agnieszka SLIWA, (sur la foto) ul. Wiosenna 1/40., Kielce PL-25-534 Polio 9-jara knabino.



ÁRVAI Judit, 14-jara knabino, kun knabo el Britio, kun knabino el Ĉinio, adr: Rákóczi u. 39, H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.


CSATTOS Natália, 14-jara knabino, kun geknaboj el ĝiuj landoj, adr: Gárdonyi u. 1. H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.

MÁDI Gabriella, 14-jara knabino, kun knabo el Aŭstrio, adr: Kossuth u. 4. H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.

30 gelernantoj (16-17 jaraj) de mezlernejo "50 Vjetori i Pavarësisë" kun samaguloj. Adreso de la instruisto: Bardhyl MEZINI, Rruga "Maliq Muço" Pall. 50. Ap. 3. Tirana, Albanio.

Koresponda Servo de Japana E-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda mati 12-3, Tokyo-to JA-162 Japanio.

Koresponda Servo de Germana Esperanto-Junularo: Yvonne Winkler v. Mohrenfels, Bruchwieswanlage 4, Box 76, D-W-6602 Dudweiler, Germanio.



Esploru vialandajn gazetojn, kiuj akceptas korespondpetojn de alilandanoj kaj skribu al ni por publikigi ilin.

SENKOSTAJ ANONCETOJ POR KORESPONDEMULOJ!

Jenaj aŭstriaĵ gazetoj presas senkoste vian korespondpeton:

- Kurier-Ombudsman, Seidengasse 11, A-1072 Wien;
- Bazar, Postfach 1041, A-1041 Wien;
- Fundgrube, Postfach 166, A-1121 Wien.

Necesas jenaj indikoj: Lando, nomo, (ina aŭ vira), adreso, aĝo, korespondlingvo(j), hobiaj. La gazetoj estas legataj en Aŭstrio, ne petu alilandan korespondanton. Gravus, ke vi indiku vian korespondlingvon esperanto. Eble tio eĉ instigos ankaŭ aliajn legantoj eklerni esperanton, se ili vidas, ke ekzistas korespondemuloj tiulingve.

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap. Nyt, sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe: 1675 Budapest, pf. 87. Tel: 128258. Megjelenik kéthetente. Terjeszti a HELIR. Készült az M & M nyomdában. H-1161 Budapest, Becsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado. Eldonas Kultura Esperanto-Asocio kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szivás. Tekniko redaktas Sándor Hildg.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

Ulrich LINS, vicprez. de UEA:

Tamen flagras vigle la fajrero

De la 28-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro 1991 en Kaunas, Litovio, kelkdek esperantistoj kunvenis por la Dua Eŭropa Esperanto-Forumo. Ili volis daŭrigi tradicion, kiun komencis la Konsultigoj de orienteŭropaj esperanto-asocioj kaj kiu estis pasintjare renovigita per tut-eŭropa forumo en Bydgoszcz. La celo estis interŝangi informojn pri la stato de la movado en la postkomunisma Eŭropo kaj diskuti vojojn, kiel intensigi la kunlaboron de la okcidentaj kaj orientaj landaj asocioj.

Litova Esperanto-Asocio (LEA) transprenis la restadkostojn de alilandaj movadaj funkciuloj kaj entute bonege organizis la Forumon. Sed bedaŭrinde nur malmultaj akceptis ĝian inviton al Kaunas. La kialoj estas pluraj: la periferia situo de la loko; nesufiĉa konsciigado al la landaj asocioj pri la signifo de la aranĝo; necerteco pri la politika situacio en Litovio (kiu iĝis sendependa nur kelkajn semajnojn antaŭe), kaj necerteco pri vojaĝaj rimedoj (por akiri lokon en trajno devas atendi tri semajnojn, kaj aŭte oni vicas dek kilometrojn pro sovetiaj komercemuloj). Krom baltlandanoj kaj sovetianoj venis nur kvar okcidentanoj, kelkaj poloj kaj hungaroj. Inter ili tamen estis tri estraranoj de UEA.

Tre ofte la diskuto koncentriĝis al la inerta stato de la movado en orienta Eŭropo — analizo de la kaŭzoj de ĝiaj sukcesoj sub la socialisma reĝo, al la malfacila transiro de malavara subteno per publika mono al sinbazado je kotizoj kaj al la ĝenerala perspektivo de la movado sub la kondiĉoj de ekstreme malbona, parte katastrofa ekonomia stato en orienta Eŭropo kaj iama Soveta Unio. Ĉiuj pli-malpli interkonsentis, ke la pasinta florado de esperanto ŝuldiĝas al esceptaj faktoroj: al "fenestra" utilo, do la privilegia vojo, kiun esperanto promesis malfermi al la ekstera mondo; la manko de alternativaj distraĵoj; la deziro de la potenculoj utiligi esperantistojn por la legitimado de sia reĝo kaj sekve disponigi al ili la kutimajn favorojn, inkl. financon subtenon ekster socia kontrolo. Nun ĉesis la sinfermo al la ekstera mondo, homoj kuradas al fremdlingvaj kursoj, aperis granda oferto de ebloj sin distri, kaj la registaroj desupre strebas resanigi la ŝtatan buĝeton. Tio preskaŭ ĉie rezultigis malmultigon de la socia membraro, maldungon de oficistoj, malaperon de eldonaĵoj.

Kion novan tiurilate alportis Kaunas?

Surpriza otimismo

La Forumo konfirmis, kiel komplika estas la situacio por esperantistoj en orienta Eŭropo. Precipe por la okcidentanoj estis utile observi tion surloke. Sed se ili atendis aŭdi unuavice plendojn, ili surpriziĝis agrable. Ne mankis malkaŝaj vortoj, kontraŭ la nesufiĉa kunlaboro inter la landaj asocioj, kontraŭ UEA, kontraŭ la "Universalaj Kongresoj por riĉuloj". Tamen, klare superregis, en kritiko, la bonvolemo kaj eĉ, en analizo de la interna situacio, modera optimismo.

Roman Dobrzynsky atentigis, kiajn ŝancojn malfermas la pli libera politika klimato en Eŭropo, eĉ se la praktiko nun ŝajnas indiki la kontraŭon,

— la hungaroj raportis, ke ne falas la nombro de membroj;

— la sovetianoj raportis daŭran interesigon pri esperanto, ĉefe inter gejunuloj. La delegitoj de Urala Esperantista Societo mirigis la aliajn per informoj pri sia eldona agado kaj la sukceso de koresponda kurso.

— la litovoj, kvankam same kiel latvoj kaj estonoj tute necertaj pri la tujaj sekvoj de la politika-ekonomia ŝanĝo je sia agado, prezentis la trian numeron de la luksa revuo Litova stelo kaj anoncis pliajn planojn: la starigon de studcentro en la iama domo de Aleksandro Silbernik en Kaunas.

Kion fari por teni atingojn kaj por plue sukcesi?

Turismon kvalite, aplikadon komerce, reklami lingvan egalrajtecon

Andrzej Grzebowski, la gvidanto de Esperetur, insistis, ke necesas daŭrigi la turismajn servojn, kiuj kvante reduktiĝis, sed nun sentas kvalitan plibonigon.

Analoge pluraj sovetianoj proponis, ke esperanto estu pli vaste utiligata en komerco — esperantistoj demonstru, ke ilia lingvo povas helpi en la kreo de entreprenoj kaj en liverado de scioj el eksterlando.

Aliaj, kiel Jaan Ojalo kaj Sergej Kuznecov, pli multe akcentis la perspektivojn, kiujn donas al la publika bildo pri esperanto la nova ondo de naciismoj kaj la "buntigo" de la lingva mapo de Eŭropo — kun la rezulta pligravigo de la problemo de transnacia komunikado. Esperanto estas, eĉ se ne oficiale akceptita, bona teoria ekzemplo de demokratio kaj netrudismo en lingvopolitiko, argumentis Kuznecov.

Oni bedaŭris decidojn pri "eŭropaj kongresoj" sen konsidero al la orienteŭropanoj, la nesufiĉan partoprenon de okcidentaj esperantistoj en valoraj aranĝoj kiel tiuj en Poprad, en diversaj hungaraj lokoj, en Pisanica, en la baltaj landoj aŭ dise tra Soveta Unio, kaj la nesufiĉan kunlaboron de la asocioj en almenaŭ tiuj landoj, kiuj estas rektaj najbaroj. Pensiga estas eldiro de Paŭlo Jegorovas, vicprezidanto de LEA: Ni en oriento estas pli solidaraj, dum en okcidento ŝajne regas pli da apartismo.


Optimismon nutras la fakto, ke ni posedas en orienta Eŭropo valoran potencialon, nome homojn, kiuj sub malfacilaj kondiĉoj (ne pro iuj ŝtataj subvencioj!) trovis siajn vojojn al esperanto, kiuj dankas parton de sia persona evoluo el esperanto kaj de kiuj oni ne povas atendi, ke ĝuste nun ili malfideliĝos.

Eĉ se furiozas naciismoj, ili ne povos detrui la konscion pri la komuneco de la eŭropa heredaĵo. Tio ĉi garantias lokon al esperanto.

el Esperanto, 11/1991

Proksimaj limdatoj

- 11.04.12-04 Pápa, Hungario, Landa Esperanto Deklamkonkurso, vidu sur p. 5.
- 13.04-20.04 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio, Printempa Semajno Internacia, por la tuta familio, Org.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, D-5483 Bad Neuenahr, Germanio, Tel: 49/2641/4885.
- 15.04-21.04, La Salle (Aosta), Italio, 15-a Internacia Junulara Festivalo.
- 17-20 aprilo PASKO, Sandra van de Hoef, Spijkerpad 89, NL-7415 AT Deventer, Nederlando, Tel: (+31) 5700 30571.
- 17-20 aprilo, SAT-amikara kongreso, Simonne Bernard, 171, rue Raymond-Poincaré, F-33110 Le Bouscat, Francio.
- 23-26.04. Expolingua Habana '92, Kubo, Internacia konferenco kaj foiro pri lingvoj, Nacia Kapitolio, Pk. 2014, 10200 La Habana, Kubo, Fakso: (0537)62-5604, kaj 62-5605.
- 24.04-03.05 Berlina Arbara Renkontiĝo, por eksterlandanoj rabato 20-100(!)% depende de lando, Michael Peters, Steglitzer Damm 32, D-Berlin 41, Germanio, Tel: (+49-30) 7969740.
- 30.04-05.05.92, Latvio Latvia Internacia Printempo (LIP-92)
- 30.04-04.05.1992 Szombathely, Hungario, Junulara Esperanto-Renkonto, tutlanda junulara amuzado kaj jarkunveno de HEJ, vidu sur p. 5.



Bonfara Spiritisma Societo estis fondita de la spiritisma komunumo de la regiono de la urbo Sao José do Rio Preto, ŝtato San-Paulo, Brazilo, por agadi ĉe la fakoj de sano, edukado, socia promocio kaj disvastigo kaj instruado de esperanto. La societo ankaŭ helpas forlasitajn infanojn, oldulojn kaj necesbezonajn homojn kiuj vivas en la ĉirkaŭurboj.

Por pli bone helpi tiujn homojn, SEB intencas konstrui ian helpo-organizaĵon kiu inkluzivos spiritisman regionan hospitalon, spiritisman edukadan instituton, instruadon de esperanto kaj diversajn aliajn helpajn aktivecojn kiuj celos la socian promociion de la homo.

La societo ŝatus kalkuli je la subteno kaj simpatio de ĉiuj esperantistoj.

Bonfara Spiritisma Societo
Av. Octacio Luiz de Marchi, 333
Caixa Postal 126
15.035 Sao José do Rio Preto, SP